



## Programo de la turismaj ekskursoj 2015 de lundo 20a de julio ĝis sabato 25a de julio

### Unua tago: alveno en Charles de Gaulle, ekiro de buso je la 10a horo al Gresillon tra Chartres (1h30)

- Vizito de la fama gotika katedralo de Chartres
- Tagmanĝo en restoracio de Chartres
- veturado ĝis la Ea kastelo Gresillon ( 2 horoj)
- Alveno en Gresillon cirkaŭ la 17a horo por loĝigo en la litĉambroj, vespermanĝo en la kastelo Gresillon

### Dua tago : tuttaga ekskurso al Angers kaj Fontevraud, pikniko apud la rivero Luaro ĉe la kastelo Monsoreau

- Mezepoka kastelo de la urbo **Angers** malantaŭ blanka kaj nigra ĉirkaŭmuro kun 17 turoj ; intene oni malkovras la tapetaron pri **Apokalipso** mendita de reĝo Ludoviko la 1a de Anĵuo ĉirkaŭ 1370
- Murtapiŝo « Kanto de la mondo » en la muzeo **Jean Lurçat** en Angers, teksita en Aubusson (urbo de centra Francujo) de 1957 ĝis 1966, ĝi spegulas la tapetaron mezepokan por esprimi kosman vizion pri Homo en Paco kaj Gloro
- Promenado tra la urbocentro de Angers al la katedralo Saint-Maurice. La skulptaĵoj de la sanktulo kaj kunuloj en kostumoj de la 16a jc. Krome belega aro de vitraloj de la 12a ĝis 16a jc., kiu ebligas kompreni la evoluadon de la vitralarto

- Abatejo de Fontevraud : 900 jaroj da historio, grandega bieno por monaĥoj kaj monaĥinoj sub la aŭtoritato de virino, « la abatino », ekde la 12a jc. Dum la regno de Ludoviko la 14a (17a jc.), nobelaj junulinoj ricevis tie kristanan edukadon. Napoleono la unua ordonis la fermon de la abatejo por transformi ĝin al malliberejo kie oni nombris ĝis 2000 viroj ; la malliberejon oni fermis nur en 1963.
- Vizito de Baugé por malkovri la kastelon de la reĝo René de Anĵuo kaj la historian apotekon de la iama malsanulejo.

**Tria tago: tuttaga ekskurso al Langeais, Azay le Rideau kaj Chinon** (tagmanĝo en restoracio)

- En la urbeto **Langeais**, renkontu la reĝon Karlo la 8a kiu edziniĝis kun Ana de Bretonujo en 1491 en la kastelo Langeais
- Apud Langeais, situas la fama kastelo de la urbeto **Azay-le-Rideau**, la juvelo de la renesancaj konstruaĵoj
- Ni vidos de ekstere la reĝan fortikaĵon de Chinon kie Johana de Arko renkontis la reĝon Karlo la 7a en 1429
- Ni vizitos la domon "La devinière" kie naskiĝis la fama verkisto **Rabelais** fine de la 15a jarcento apud Chinon

**Kvara tago: tuttaga ekskurso al Blois kaj Chambord** (pikniko)

- La reĝo Ludoviko la 12a naskiĝis en la kastelo de la urbo **Blois**, li edziniĝis kun la dukino Ana de Bretonujo kiam Karlo la 8a mortis sen heredanto kaj ili loĝis precipe en tiu kastelo. Francisko la unua, la postsekva reĝo, konstruigis novan alon en renesanca stilo
- **Proksime de Blois, situas la grandioza kastelo Chambord, konstruita de reĝo Francisko la unua, ne por loĝi, sed por ripozi post ĉasado en la granda arbaro.**

**Kvina tago: tuttaga ekskurso al Amboise kaj Chenonceaux** (tagmanĝo en restoracio)

- La reĝo Karlo la 8a naskiĝis en la kastelo de la urbo **Amboise**, konstruigis reĝan loĝejon per italaj laboristoj kiam li ekregis en 1491 (komenco de la franca renesanco) kaj mortis tie pro fruntofrapiĝo kontraŭ la supra sojlo de pordo!
- Vi renkontos la lastan reĝon kiu vivis en Luar-kastelo, Francisko la unua kaj Leonardon de Vinĉi (ni vizitos la domon kie li vivis apud la kastelo de la reĝo)
- Proksime de Amboise, situas la kastelo de la komunumo **Chenonceaux**, nomita la kastelo de la damoj, tie vivis Diana de Poitiers kaj Katarina de Mediĉoj

**Sesa tago: veturo al Lille buse tra Versailles (2h30), pikniko kaj vizito de la kastelo kaj parko**

informoj en [gresillon.org](http://gresillon.org)